Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo merkredon la 25-an de septembro per Skype.

(Protokolo aprobota la 9-an de oktobro 2014.)

Partoprenis:
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Mario Machlik en Tromsø
Amelie Matt en Tromsø
Herman Ranes en Trondheim

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 21-an de aŭgusto
Aprobita.

2. Ekonomio
La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst kr 44 467,-
Skagen Høyrente kr 125 612,- Tiu sumo jam inkluzivas transigon de 60 000,- kronoj de la uzkonto en DNB.

3. Seminario
Nun ni havas la jenajn prelegontojn : Amelie - enkonduko, Anne Karin - klingona, Douglas - interlingvao, Herman - solresolo, Mario - volapuko. Amelie pretigos la detalan programon kaj anoncos ĝin en N.E., en nia hejmpaĝo kaj pere de nel-inform.

4. Jarraporto 2013
En la jarraporto mankas nur la sekvaj partoj : membro- kaj abonstatistiko, ekonomio kaj la konkludo. Ni esperas aprobi la pretan jarraporton kadre de eksterordinara interkonsiliĝo la 9-an de oktobro.

5. Eventualaĵoj
A, Antaŭ kelkaj tagoj ni ricevis la malĝojan informon pri la forpaso de Helge Knudsen, nia revizoro. NEL sendos florkronon al la funebra ceremonio.
B, NJE diskutis eventualan reeldonon de broŝuro, sed ili volas atendi pri ĝi ĝis kiam Pasporta Servo denove estos bone funkcianta.
C, Ni proponos, ke ĉifoje la redaktoro verku ĉefartikolon por la venonta numero de N.E.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30 - 20:25
La venonta ordinara interkonsiliĝo okazos la 23-an de oktobro 2014, sed eksterordinara interkonsiliĝo jam la 9-an de oktobro.

Raportis Mario Machlik